



«Eĉ pli bona ol ĝia elstara antaŭiranto»



La aventuroj de ALICO en MIRLANDO



Ĝui Esperanton, kaj perfektigi ĝin samtempe

Ed Robertson

ĈU VI EBLE MEMORAS LA EKAPERON de la lernolibro *Teach Yourself: Complete Esperanto*, antaŭ tri jaroj, kiu gvidis lernantojn de Esperanto ĝis la nivelo B2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER)? Aŭ ĉu eble vi mem tralaboris ĝin? Nun haveblas la sekvo, verkita de Tim Owen, unu el la kunaŭtoroj de ties antaŭiranto. La nova libro *Teach Yourself: Enjoy Esperanto*, ĝia sekvanto, gvidos vin de tie al pli memstara kaj pli memfida posedo de Esperanto, kaj supren al nivelo C1.

Laŭ pedagogoj, la postuloj de nivelo C1 de la KER, la preskaŭ-plejalta nivelo de lingva majstriĝo por nedenaskulo, estas kiel jene: La lingvo-uzanto (je tiu nivelo la vorto «lernanto» fariĝas pli kaj pli neadekvata vorto) kapablu kompreni larĝan gamon da postulemaj, pli longaj tekstoj, kaj rekonu implicitajn signifojn. Ŝi aŭ li kapablu esprimi sin flue kaj spontane, sen tro da serĉado de esprimoj; kaj uzu la lingvon flekseble kaj efike por sociaj, klerigaj kaj profesiaj celoj; ŝi aŭ li kapablu verki klaran, bone strukturitan, detalan

tekston pri kompleksaj temoj, montrante lertan uzadon de organizaj ŝablonoj, konektiloj, kaj koherigaj trukoj.

Aŭtentikaj fontoj

La celo, kiun la libro starigas por si, estas «plibonigi fluecon kaj faciligi komunik-

adon», kaj helpi al la lernanto pli kapable konversacii, kaj senti sin malstreĉa en ĉiu lingva situacio en Esperanto. Tion ĝi faras per la uzado de aŭtentikaj Esperanto-tekstoj, ĉar en Esperanto oni ja povas fari tion, ĉar iam ja venas punkto kiam oni ne plu bezonas speciale redakti tekston por komenc-

antoj, kaj tiu komencinto fariĝas plenrajta ano de lingvo, kiu kapablas elekti inter vortoj tiun kun la ĝusta signifo aŭ emfazo aŭ stilo.

Tio ebligas al la lerninto fari aferojn, kiujn oni ne atendus ĝis post multaj jaroj da studado en iu ajn alia lingvo, ekzemple: ŝalti la transitivecon de verbo, aŭ eĉ krei novajn vortojn per lerta uzado de la



afikso-sistemo. La verbo «ĝui» en la titolo ne estas miso aŭ troigo. La libro prezentas la Esperanto-mondon mem, la kulturon kaj historion de la Esperanto-parolantoj, honeste kaj sobre, same kiel oni atendus en lernolibro pri iu ajn alia lingvo.

«Eĉ pli bona»

Mi povas honeste diri, ke mi vere ĝuis tralabori la kurson, eĉ se mi ne plu aparte bezonas lernilon. Se vi alkitimiĝis al la sekaj lernolibroj de

10 Projektoj kaj subvencioj Projects and grants

In this unit you will:

- examine complex phrases and learn how to use the reflexive in them.
- identify implied subjects of verbs.
- learn how to identify where a noun has an implied subject.
- use prepositions as prefixes, including those which have dual meanings or a grammatical effect.

CEFR: (C1) Can follow most lectures, discussions and debates with ease; can understand in detail lengthy, complex texts provided he/she can reread difficult sections.

↑ Celoj estas klare indikataj.

↓ Informas pri historiaĵoj.



Various versions of the *Unua Libro* and *Dua Libro* showing 'Esperanto' as the name of the author, and a letter from 1887 in which Zamenhof signs his name as 'Esperanto'.

↓ Kompreneblaj klarigoj pri gramatikaj terminoj.

agglutination

The process of creating words by combining smaller elements: *malsanulejo* is formed agglutinatively with *mal-* + *san* + *-ul-* + *-ej-* + *-o*.

animate noun

A noun which applies to something which is alive or sentient.

apposition

A construction in which two elements, normally noun phrases, are placed side by side, with one element identifying the other in a different way. A restrictive appositive follows a noun and is an identifying description of it, which stays in the nominative case: *Mi renkontis doktoron Ludoviko Zamenhof.* (I met Doctor Ludoviko Zamenhof.) A non-restrictive appositive is grammatically parallel to the noun being described, and can be in other the nominative or accusative case: *Ni vizitis Parizon, la ĉefurbon de Francujo.* (We visited Paris, the capital of France.)

Glossary of grammatical terms 173

antaŭaj epokoj, vi spertos agrablan surprizon. *Enjoy Esperanto* estas miaopinie eĉ pli bona ol ĝia elstara antaŭiranto *Complete Esperanto*, kaj eĉ egalitacion ja estus defio. Ĉi tiu libro estas ĝuste tia libro, kia pasinteco mankis al mi, kiam mi ek-lernis Esperanton. ■

Enjoy Esperanto estas disponebla de EAB kontraŭ £17.50: duonpreze kompare al la rekomendata vendoprez: enjoy.esperanto.org.uk



De Tim Owen, unu el la ĉefaj kleruloj kaj verkantoj en Esperantujo, venas nova, dua volumo por superaj lernantoj, unika laŭ siaj enhavoj kaj aliro. Utiliginte siajn vastajn personajn sciojn pri la lingvo, ĝiaj historio, kulturo kaj literaturo, li kreis senegalan tekston por nova generacio.

Tiu ĉi lernolibro devus doni al la lernanto altan nivelon de kompetento pri la lingvo, kaj profundajn sciojn pri la komunumo de Esperanto-parolantoj. Ĝi prezentas modernan Esperanton, kiel ĝi nun estas uzata kaj parolata ĉirkaŭ la mondo. Mi estas persone ravita, ke ĝi estas disponebla.



—LEE MILLER, DIREKTORO, SEKCIO POR LA KONTROLADO DE LERNRIMEDOJ, AKADEMIO DE ESPERANTO

